

SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN LA ESPERO

Oktober 1945

33 årg. Nr 10

ORGAN FOR SVENSKA ESPERANTO-FORBUNDET

SURVOJE AL LA VENKO.

Jam antaŭ la fino de la milito multaj aranĝoj estis preparataj por renkonti la postulojn de la paco. Multaj internaciaj organizaĵoj ankaŭ provis prepari sin. Inter ili sin trovas ankaŭ la Esperanto-movado. Apenaŭ ĉesis la milito, kiam la esperantistoj en la diversaj landoj denove kontaktiĝis.

Venis sciigo el la eksterlando, ke niaj samideanoj ĉie penadas revivigi la Esperanto-movadon, kiu en multaj landoj ne rajtis publike ekzisti. Nin atingis kortuŝaj informoj pri la travivaĵoj de niaj amikoj dum la milito. En la oficiala organo de I. E. L. pastro Cseh elokvente rakontas pri la sistema detruo de la internacia Cseh-instituto flanke de la germana gestapo. Sed pastro Cseh deklaras, ke oni rekomencos la agadon. Sinjoro Petit en Francujo priskribas la bravan sintenadon de la francaj esperantistoj dum la okupado. Sinjoro Kempeneers en Belgujo informas pri la savo de la belga esperantismo. Kaj el la malfeliĉa Ĉeĥoslovakujo venis kiel triumfa fanfaro alvoko al alilandaj esperantistoj. La tieaj esperantistoj sukcesis jam interkonsenti kun la radio en Praha, kie oni ĉiuvespere dissendas 10-minutan programon en Esperanto per mallonga ondo. La ĉeĥoj cetere proponis al nia federacio, ke ni organizu en Svedlando rondvojaĝon por granda ĉeĥa kantistaro, konsistanta el 60 personoj. Tiu propono tamen bedaŭrinde estas malfacile efektivebla. Venis ankaŭ letero de s-ro Forge-Fetke, kiu nuntempe loĝas en Praha. Li skribas, ke la ĉeĥa ŝtato verŝajne eldonos propagandfilmojn en Esperanto pri tiu lando. Pri niaj najbarlandoj ni povas raportiti, ke la norvega ligo havis tre sukcesan jarkongreson en la fino de julio, kaj ke la dana asocio jarkunvenos en oktobro.

Ĉie ni vidas aktivecon. Ni do povas atendi, ke Esperanto denove estos vere praktika ilo inter la popoloj. Esperanto estos ne nur idealisma afero, ĝi provos

doni realan helpon en plej diversaj manieroj. El multaj landoj esperantistoj skribas al ni kaj volas korespondi kun svedoj — ni estas vere superŝutitaj de korespondemuloj. Tial ni proponas, ke tiuj svedoj, kiuj emas korespondi, sendu leteron aŭ karton al S. E. F., kiu volonte perados kontakton.

La aktiveco de la esperantistoj estas ankaŭ videbla en Svedlando. Nun pasis la propaganda semajno. Ĉie en la lando oni vidis la belajn afiŝojn, kiujn S. E. F. pretigis por la ĝenerala propagando. Samtempe distribuiĝis 20.000 flugfolioj. En multaj lokaj gazetoj aperis interesaj artikoloj. Laŭ ĝis nun ricevitaj raportoj komenciĝos Esperantokursoj en multe pli granda skalo ol dum multaj antaŭaj jaroj. La Estraro de S. E. F. atendas, ke ĉiu loka grupo eluzos ĉiujn eblecojn por starigi kursojn. Ne hezitu propagandi! Kaj oferu vin kiel instruiston! Dank al la penadoj de la Esperanto-instituto multaj personoj trapasis Esperantoekzamenon. Ni do havas kompetentajn instruistojn. Vi kiu estas ekzamenita prenu sur vin la taskon gvidi kurson, eĉ se ĝi estas malgranda!

La sveda gazetaro, kiu dum la militaj jaroj nur sporade menciis ion pri Esperanto, denove estas atentata pri nia afero. Kaj la ĝenerala publiko nun malfermas siajn orelojn por bone aŭdi nian proponon pri lernado kaj uzado de Esperanto. Oni ankaŭ povas konstati, ke certaj rezultoj jam estas atingitaj. En la lasta tempo ni ekhavis kontakton kun du landaj organizaĵoj, kiuj deklaris sin pretaj aktive labori por nia lingvo. Temas pri "Sveriges Ideella kamratförbund" (= Sveda Idealisma Kamaradasocio) kaj "Ungdomens Fredsförbund" (La Pacasocio de la Junularo). Ni kore bonvenigas tiujn asociojn kiel kunlaborantojn por nia afero, kaj ni esperas, ke aliaj organizaĵoj sekvos ilian ekzemplon.

Ni havas la antaŭsenton, ke la cirkonstancoj estos

Ni forĝu...!

En konekso kun la "Esperantosemajno" la gvidantoj de SEF ege faciligis la propagandolaboron al la esp.-grupoj. Ili disponigis grandan nombron da afiŝoj, reklamfolioj, gazetartikoloj k. t. p. Nun dependas de la "simplaj" soldatoj de la verda armeo, ĉu la bonega laboro flanke de SEF estu fruktoporta aŭ ne !

Sendube la granda publiko nun pere de la farita propagando estas tre bone informita pri la utilo, kiun oni povas havi de Esperanto. Do, ni nepre forĝu dum la fero estas varmega . . . ! Ĉiu esp-grupo kaj ĉiu unuopa esperantisto aktivigu! Antaŭ ĉio ni provu starigi studrondojn en ĉiu loko, kie antaŭ la milito troviĝis intereso al nia lingvo. Jes, nun post la milito neniu el ni *rajtas* resti pasiva, sed ĉiu el ni alportu nian "brikon" por ke nia sveda esp-movado denove plifortiĝu . . . ! Kuraĝe kaj diligente ni laboru por venki la konkurantojn, kiuj de tempo al tempo aperigas novajn projektojn de mondlingvo. Pro la venko de la aliancaj ŝtatoj la angla lingvo certe ludos tre gravan rolon en la internacia kunlaboro, sed pro tio Esperanto ne estas superflua. Neniu nacia lingvo efektive povas konkurenci kun Esperanto kaj transpreni ĝian rolon! Esperanto ne nur estas lingvo, sed ĝi ankaŭ estas interfratigilo kaj tiu ĝia rolo ne estas la malplej grava . . .

Por kompreni nin ĉie en la mondo ne sufiĉas, ke ni nur scipovas la anglan lingvon, ne, ni devas ankaŭ lerni la germanan, francan, rusan, italan k. a. Kiom multaj el ni povas dediĉi tiom da jaroj al studoj de lingvoj? Certe neniu! Pro tio ni kiel raciaj homoj kompreneble elektis la plej facilan el la lingvoj, do Esperanton. Kompare al la naciaj lingvoj Esperanto ja estas relative facila, sed nur relative . . . Ankaŭ la studoj de Esp. postulas certan tempon kaj intereson! Ni ne estu blindaj por la malfacilaĵoj, kiuj vere aperas sur la vojo al plena majstrado de la lingvo . . . ! Por fariĝi perfekta esperantisto necesas, ke ni serioze kaj sisteme studu ĝin! Ni ne troigu la facilecon de Esperanto, sed avertu ĉiun studenton pri la ekzistantaj malfacilaĵoj. Alie ni nur trompas ilin kaj tiumaniere ni tute ne povas pligrandigi la nombron da esperantistoj . . . Male, ni nur faras ursan servon al la lingvo, logante grandan nombron da personoj studi ĝin. Post kelktempa studo la novaj disĉiploj forlasas niajn vivojn . . . konstatinte, ke la lingvo ne estas tiel facila, kiel ni emas aserti en la propagando.

Jes, antaŭ ni estas multaj labortaskoj, sed pro tio ni ne perdu la kuraĝon! Ne, tio nur spronu nin des pli streĉi la fortojn por atingi "brilan rezulton" de nia laboro. Iam ni certe havos okazon rikoliti tion, kion ni semis . . . Povas esti ke kelkaj grenejoj neniam aperas aŭ estas rikolteblaj, sed tiun riskon ni prenu! Do, ek al labor' . . .

E. H u l t.

pli kaj pli favoraj por Esperanto. Estas do nia devo ne bari la antaŭenmarŝon sed ĉiel subteni kaj helpi — ĉiu en sia loko.

Ĉar Esperanto estas survoje al la venko!

L a p r e z i d a n t o d e S.E.F.

Printempo.

Mezsomera letero al aŭtuna numero de **Ella Nilson.**

Kiam oni vekigis en la mateno la 8an de majo oni pensis: Ĉu mi songis? Ĉu estas vero?

Printempo ja venis!!! Trans landojn kaj marojn estas portata mirinda mesaĝo: **P a c o !!!** Do estas vero! Miraklo okazis! La sanga ludo estas finita. La soldatoj mallevis la armilojn. La kanonoj silentigis, neniam bomboj plu detruos kaj mortigos. La limbaroj baldaŭ malaperos kaj la homoj denove povos amike interrilati.

Ĉu printempo iam estis pli bela ol en ĉi tiu jaro? Ŝajnis kvazaŭ ĉio en la naturo preparus sin por la tago de l'paco.

Ĉiu ĝardeno similis al dolĉa Edeno, kaj la fagoj, kies burĝonoj malfermiĝis jam fine de aprilo, en la tago de l'paco estis tute verdaj.

Najtingaloj trilis inter prunelujoj kaj sovaĝaj pomarboj, la paduso odoris kaj saksifragoj riverencis en la herbo.

Mi memoras du pentraĵojn, laŭ temo tute malsimilajn, kiuj profunde impresis al mi:

"Printempo" de Millet en la Louvre-muzeo kun florantaj fruktarboj kontraŭ hela blua ĉielo tre ravis per siaj delikataj koloroj, kaj tiu mirinda printempa etoso, kiun la artisto tiel majstre sukcesis fiksi sur la tuko: la vasto vibras pro lumo. La blankaj kaj rozaj petaloj vivas. Oni kvazaŭ sentas mildajn printempajn odorojn kaj aŭdas trilon de alaŭdo en la aero. Oni travivas la tutan printempan ĉarmon ekde la unua tusilago ĉe voj-rando ĝis la dolĉa konvalo en arbaro.

Kelkaj japanoj sidis antaŭ siaj pentrostabloj por kopii la belan artaĵon. Iliaj okuloj brulis pro deziro povi kapti per la peniko iom de la subtila spirito de "Printempo".

La alian pentraĵon "Trofeoj" de Veriŝagin mi vidis en artgalerio en Moskva. La griza novembro lumo, kiu enŝteliĝis tra la muzea fenestro, pliigis la timigan efekteton de la unika artaĵo: Dezerta kampo, sur kiu sin levas al minaca ĉielo fantome brila piramido el kranioj. Per sia kruda realismo ĝi treege impresis. Homo, kiu kiel mi neniam travivis militajn teruraĵojn, eble inklinitus kulpigi la artiston pri troigo kaj efektemo, sed ĉi tiu sendube atingis sian celon: vekti abomenon kontraŭ mortigo, milito. Ankoraŭ sonas al miaj oreloj la vortoj de iu rusa ĵurnalisto: — "Baldaŭ ni denove estos en milito". —

Milito! Kiu povus kredi tian malgajan profetaĵon! Ĉu ĝi ne estas produkto de trostreĉita cerbo? Ĉu Ruslando partoprenos eventualan militon, Ruslando, kiu bezonas pacon por realigi siajn grandiozajn projektojn?

Kiu povus kredi, ke baldaŭ komenciĝos sanga dramo, kompare kun kiu ĉiuj antaŭaj ŝajnas nur infanaj ludoj!

Mi kelkfoje pensis pri la pentraĵo en la rusa muzeo. Nur pala kopio ĝi ŝajnas de la kruela realeco. La originalo estas multoble pli timiga, la piramido pli alta, la koloroj pli intensaj, ĉar ili konsistas el la sango de milionoj da senkulpaj homoj.

Ses jaroj de turmentoj kaj mortigo, de subpremo kaj perforta regado!

Tamen neniu nokto estas tiom malluma ke ne fine tagiĝas. La vivo fine venkas la morton. Longa vintro fine ĉesas, kaj printempa spirito revivigas la nigran humon.

Miraklo okazis. Printempo estas veninta. Ŝajnas al mi, ke ĝi ĵus komenciĝis, ke la unua anemono ĵus vekigis pro la suna varmo.

En paco la homoj eklaboros, rekonstruos, dezertigitaj kampoj verdiĝos, kaj la ĉielo volbas sian brilan arkaĵon super floranta mondo.

Dolĉa printempo! Estu ĝi eterna! Kunportu ĝi al la tuta homaro ĉiaman pacon!

E l l a N i l s o n .

Födelsedagar.

Fru Signe Boye, Stockholm, 70 år den 11 okt.

Lärov.-adj. Carl Ohlsson, Bollnäs, 60 år den 18 okt.



Vetlanda Esp.-Klubb aranĝis en Ekspozicio de la urbo mazsomere propagandadon por nia lingvo. Nia bildo montras la murekspozicion. Multaj vizitantoj montris sian intereson kaj elparolis sian laŭdon por la kluba laboro.

LITERATURO.

Malgranda revuo, Stellan Engholms esperantotidning, har även i år trots alla motigheter kommit med ett nummer. Det visar ingen tillbakagång, tvärtom, och det är dystert att läsa, hur den svenska marknaden är lika trög som den internationella stängd och att alltjämt Engholms djärva försök att skänka världen ett esperantistiskt forum lever på utgivarens kassa och obetalda möda. Sänd ett postgirokort på 1 krona till Red. S. Engholm, Ludvika, postgiro 26 80 23, så kommer ett häfte av Malgranda Revuo, ett häfte lika prydligt som iäsvärt. Du ångrar inte Din krona. Även om den första skulle leda till -- att Du sänder fler.

LA PASTRO EN VEJLBYE estas la titolo de bela kajero, 48 paĝa, enhavanta tradukon de la kriminalrakonto de Steen Steensen Blicher, dana verkisto el la komenco de la antaŭa jarcento. La realismo de la blichera novelaro ne akiris rekonon ĉe liaj samtempuloj. Nia tempo pli bone komprenas lin kaj la nun tradukita novelo estas plena de tragedia kaj kortuŝa materio. La libro estas aĉetebla kontraŭ 4 intern. respondkuponoj ĉe s-ro Aage Hunderup Petersen, Pilevej 26 B. Odense.

TRA DENSA MALLUMO estas la trafa titolo de alia, iom pli frue (1942) eldonita libro, veninta el Danlando, kiu aperis okaze de la jubileo de la Laborista Esp. Klubo de Kopenhago. La 60-paĝa eleganta volumo enhavas esperanto-eseojn pri la movado kaj lingvo, kolektitajn ĉirkaŭ tri temoj: La kluba vivo, la nuna kaj la estonta esp.-movadoj kaj la esperantologio kaj ties disciplinoj.

Kiam tiu tre valora libro estos distribuata kaj konata, certe ĝi vekos atenton ĉe niaj verkistoj pro siaj novaj kaj aŭdacaj vidpunktoj.

Irlando vokas är namnet på ett flygblad som irländska journalister varannan månad ge ut på esperanto under mottot: "Konigi Irlandon al Tutmondo" (Göra Irland känt över hela världen).

Septemhernumret har just kommit oss tillhanda och inledes med meddelande om senaste presidentvalet (14 juni), då S-ro O Ceallaigh valdes för sju år till statschef. Han övertog den 25 juni sitt höga ämbete under högtidliga former.

Flygbladet vänder sig till esperantisterna med följande:

Esperantistoj (unuope aŭ societe) kiuj volas gratuli al S-ro O Ceallaigh okaze de lia Prezidantigo devus

skribi simple kaj tre klare en Esperanto mallongajn leterojn aŭ kartojn. Prefere, ili ne faru demandojn, kritikojn aŭ plendojn. (Adreso: Prezidanto O. Ceallaigh, Arus an Uachtaráin, Dublin, Irlando.)

Flygbladet innehåller en redogörelse för den stortartade hjälpverksamhet till förmån för krigsskadade länder, som pågått och pågår i Irland.

"Irlando vokas" lämpar sig för högläsning i Esperantoklubbar och ett provexemplar erhålles mot 1 svars-kupong i brev till S-ro Lorcan O' hUigginn, Sonas Cnoc na hInneona, Dundroma — Dublin, Irlando.

Kio nova en eksterlando?

VIVSIGNO EL VARSOVIO. S-ino Wanda Zamenhof kaj Ludoviko, la nepo de la Majstro vivas laŭ la telegramo, kiun Universala Esp. Asocio en Genevo ricevis el Varsovio kun la dato de la 9-a de junio (tra Moskvo). La traduko de la franc-lingva telegramo estas: "Wanda Ludoviko vivas salutas petegas serĉi Adamon kaj bofraton Henri telegrafu Varsovio Mykotov Lowicka 39 a.

SVISA ESP. SOCIETO skribas al ni: ... Post nia alvoko por la Svisa Espero venis el diversaj landoj sufiĉe multaj mendoj por specimeno. Tuj ni plenumis nian devon kaj sendis la gazeton, sed post unu monato revenis la plimulto de la forsenditaj numeroj ... Kompreneble ni konservas la adresojn kaj tuj kiam ni ekscios, ke ĉiuj landoj permesas la transiron de nia gazeto, ni denove sendos la ekzemplerojn.

SVISA ESPERO, la oficiala organo de la Svisa Esp. Societo enhavas raportojn pri la jarkunveno de la svisaj esperantistoj, dum kiu s-ro J. Gilliard fariĝis prezidanto, s-ro O. Walder sekretario. Oni menciis Svedlandon kiel invitonton de la plej proksima Universala Kongreso. Ankaŭ por Prago oni aŭdis voĉojn, pro ĝia centra situo kaj pro la eventuala oficiala subteno.

DANLANDO

95 danaj partoprenantoj de la feriaj Esperantokursoj en Helsingør (la internacia altlernejo) kaj en Ask (Jutlando) sendas al ĉiuj svedaj gesamdeanoj la plej korajn salutojn, esperante ke en la venonta somero ni havos ankaŭ multajn el vi ĉi tie. Dum ĉiuj 5 jaroj de la okupado ni konstante, sed sekrete, aranĝis niajn somerajn kursojn. Sed ni tre sentis la mankon de la internacia karaktero de niaj feriaj aranĝoj.

Ĝis la revido en la venonta somero en Helsingør.

La kurskomitato

Margr. Noll. L. Friis. Ida Christensen.

Dansk Esperantoblads julinumner är en enda lång hyllning till de återvändande normala förbindelserna utåt. Som största nyhet har man glädjen meddela att Utlandskontrollen medgivit fri användning av esperanto i korrespondens med utlandet.

BELGUJO.

Flandra Esperantisto som efter 4 års uppehåll utkommit med n:r 1 och 2 av sin 10:e årgång, pryder sitt första nummer med en kliché, visande de illegala flygblad, redaktionen utgivit under ockupationstiden.



Tionde Brasilianska Esperanto- kongressen.

Då de brasilianska esperantisterna inbjödo till allmän kongress i april i år, anmälde sig 24 esperantoföreningar, av vilka 5 från Argentina, 1 från vardera USA, Bolivia och Uruguay. Det blev en kongresslista på 453 personer, varav 40 främlingar. — Kongressen hölls i Rio Janeiro och fick ett lysande förlopp, icke minst genom kraftigt understöd från myndigheternas sida. Dess högtidssammanträden voro förlagda till utrikesdepartementets palats och dess arbetssammanträden till historisk-geografiska institutet.

Kongressens inramning av festligheter var inriktad på att utåt visa esperantos användning som smidigt kongressspråk — föredrag, orationer och diskussioner — som teaterspråk i både komedi och drama, som musikaliskt språk, vid konserter, gudstjänst, kabaréer och uppläsningar.

Kongressens egna förbundsuppgifter inriktades på att uppnå kontakt med San Francisco-konferensen och ett antal brasilianska institutioner för att för dem framhålla hur de i sina publikationer kunde använda esperanto. Man har som bekant ypperliga exempel att peka på, i det Brasiliens statistiska byrå sedan flera år använt sig av esperanto-resuméer i sina årsböcker. Till Geografisk-statistiska institutet ingav kongressen ett förslag om att genom institutets försorg få Brasiliens esperantister och esperantoföreningar bokförda.

MAROKO. De Casablanka venis la maja numero de "La Verda Flamo" monata revuo de la Maroko-Esp. Asocio. La numero ne enhavas multe da informoj pri la movado (krom kelkaj adresoj), sed ĝi estas enhavoriĉa kiel instruilo kun sentencoj, rakontoj, enigmoj, anekdotoj ktp.

S U O M I - F I N N L A N D O .

Nova finnlingva flugfolieto "Le vero pri la studado de fremdaj lingvoj" estas eldonita en la presejo de Loimaa. La verkinto estas pseŭdonimo "Progreso".

En la folieto oni forte akcentas la bezonon enkonduki en la lernejojn la plej facilan lingvon internacian Esperanto. En la finnaj lernejoj oni tute vane kaj kun tre malmultaj rezultoj studadas 3—8 diversajn lingvojn. La junaj homoj, vizitintaj la 5-klan mezlernejon, aŭ fariĝintaj jam studentoj, ne ellernis bone eĉ unu fremdan lingvon, ne tiel bone, ke ili kapablus en praktiko flue skribi kaj paroli la lingvon. La homo povas esti jam studento, magistro aŭ doktoro kaj ne povas bone estri lingvojn, ĉar nur tre malmultaj homoj havas tian energion, ke ili post la tempo de lernejrado daŭrigos la studojn. Post kelkaj jaroj ili kutime preskaŭ tute forgesas eĉ tiun minimuman sciadon, kiun ili lernis en lernejo. Tio estas granda perdo de mono kaj tempo por la kulturo, kiun oni nepre devus raciigi samkiel oni postulas tion de la teknika kaj ekonomia kulturoj. Nur la senpartia kaj facila lingvo Esperanto solvus la problemon, kaj farus tion, laŭ sperto akirita en multaj landoj kaj esprimita en la Pariza konferenco 1937, dum d u v i n t r o j !

Till prenumeranterna på Norska Esperanto-Bladet.

På grund av svårigheter att få den norska tidningen tryckt har dröjsmål uppstått. Man har bett oss lugna abonnenterna med att den kommer.



La unua internacia kurso postmilita en Finnlando.

100 esperantistoj (92 finnoj, & 7 kaj ½ da Svedoj kaj ½ Rumano) partoprenis en paradiza Punkaharju. Dum 8—15 julio.

Post dusemajna kurado al diversaj svedaj aŭtoritatoj (Armeĉefo, Gubernia administrejo, Komerca komisiono) kaj afabla Finna Legacio jen ni havas en nia mano la pasporton kun vizo, licencon por pano, sukero, butero, kafo-teo kunportitaj kaj 99 svedajn kronojn (oni ne rajtis kunpreni pli da sveda valuto). Rapida, afabla sveda dogan-kontrolo.

Malfrue vespere ni alvenas al Helsinki pli ol 24 horojn post la ekveturo. Ĉarma samideanino Kaija Taskinen kune kun aliaj gesamideanoj bonvenigas nin per fragoj. Lacegaj ni "falas en dormon". Varma sunbrilo vekas nin kaj akompanas tra bombita finna ĉefurbo kie, almenaŭ en la centra urboparto, surprize rapide oni forigis vundojn kaŭzitaĵojn de milito. Tamen la angla legacio havas ankoraŭ gapantajn fendojn. Kaj multe da aliaj finnaj konstruaĵoj.

Ni preterlasu la duan fervoj-vojaĝon. Fine ni alvenas al Punkaharju. Bonvenigas nin amiko Kaarlo Jokinen, la ĉefmotoro de la kurso, kiu — kvankam malgraseta de la naturo — forŝvitis 3 kilogramojn kaj ½-on dum la preparaj laboroj. Jen salutas nin leonharara magistro Vilho Setälä, la sciprovizanto de la somerkurso kaj direktoro de la Finna Esperanto-Instituto. Li ĝoje rakontas al ni ke la finna ŝtato — malgraŭ malfacilaj ekonomiaj cirkonstancoj — konsentis gravan financan subtenon al la somerkurso. Inter la bonvenigantoj troviĝas verdstela veterano, staciestro Salokannel (kiu instruis pri esp. historio dum la kurso) kaj instruisto Svante Kivinen, kiu dum la tuta kurso kun senkompara energio gvidis gajigan kantadon: "Hej, lari, lari, lej, hej lari-lari-la" (eĉ nun resonas en niaj oreloj la gajaj melodioj) laŭ freŝe eldonita kantaro de la Finna Esp. Instituto . . .

Punkaharju, Punkaharju, Punkaharju! Lagoj kaj arbaraj insuletoj. Arbaraj insuletoj kaj lagoj. Ne-priskribeble bele! Veturu kaj travivu ĝin. Poste kaŝu la belegon en via koro. Riĉa kapitalo, el kies memorrentoj vi povos vivi dum la resto de viaj jaroj.

Dum la tuta kurssemajno ni havis ĉirkaŭ 30-gradan varmon (eĉ solan fojon ne pluvigis). Iom lacige sed ĝoje ni eltenis dum 5—6-hora instruado potaga de ruman-sveda Morariu & Kompanio sidante sur herbtapiŝo sub sveltaj pinoj. Kaj ĉiun liberan momenteton ni pasigis en refreŝigaj ondoj de apuda lago. Ni travivis ankaŭ s a u n a n (finna vaporbanejo). Ni batis nin per betulaj branĉetoj kaj uzis la foliareton kiel bankostumon survoje al la akvo. Bums! Ni falis kiel pilkoj en la akvon . . .

Viandon ni ne tre vidis dum la manĝoj. Kaj buteron manĝis tiu kiu kunportis el Svedlando. Lakto estas kontraŭ kupono. Por infanoj plena glaso, por plenkreskuloj duona glaso potage. Al la lunĉo ni ricevis terpomon kun bruna saŭco. Al tagmanĝo brunan saŭcon kun terpomo. Tamen ni estis kontentaj. Mirindan s i s u (fera energio) havas tiu ĉi eta, sed roke firma popolo, kiu ankoraŭ kun ne cikatriĝintaj vundoj plenforte eklaboras



por pacaj aranĝoj. Antaŭ nelonge soldatoj ripozis en tiu ĉi feria vilaĝo inter la bataloj. (Neniu privata domo ekzistas tie ĉi). Nun kultursocietoj abonas tutjare la hoteleton por ripozigi siajn anojn. Tre malmulte kostis la tuto (entute 60 kr. por loĝo, manĝo, ĉio).

100 partoprenantoj el 3 landoj kaj 25 lokoj kolektigis sub la verda standardo kaj blank-blua finna flago. Kaj 40 % de kursoj A—B—C faris ekzamenon post la kurso! Imitinda ekzemplo.

Jen ni ĝuis koloran spektaklon de popolkostumaj dancantoj de laborista esperanto-grupo el Helsinki, jen la naturo liveris malhelan spektaklon. Certe neniu forgesos la suneklipson de Punkaharju, unu el la lokoj en la tuta mondo, kie oni plene povis ĝui la maloftan naturfenomenon. Kiel la luno formangis la sunon. Kiel malaperis la lumo. Aperis la steloj. Eksilentis la birdoj. Ekregis mistera malvarmeta timiga atmosfero. Nur krona aŭreolo tremis ĉirkaŭ la suno. Tamen la mallumo daŭris tre mallonge (apenaŭ sufiĉis por ŝteli s u k o n — finna nomo de kisetio — de la najbarino).

Reen al Helsinki.

Reveturo al Turku. En tiu loko rusaj militmaristoj krias al ni "Stokholmo-Stokholmo" kaj geste klarigas al ni ke nia ŝipo jam forveturis. Nia trajno alvenis nur ½-an horon post la kutima tempo. Sed la kapitano ne povis atendi nin. Li devis urĝe renkonti sian fianĉinon en Mariehamn . . .

Tial subskribinto devis resti ankoraŭ 3 tagojn en Turku. Sen manĝkupono. Por ke vi komprenu taksu la ĝustan valoron de pacaj kondiĉoj — veturu al militinta lando! Tiam vekigis helpemo en via koro. Kaj ĝoje vi rezignos pri certe multe da superflua manĝkuponoj favore al Finnlando kaj sendos ilin tuj trakrucitaj al "Kuponginsamlingen 1945", adreso: Stockholm 5. Aŭ donacos esperantajn librojn al finnaj samideanoj, kiujn valuta leĝo malebligas mendi tiajn el eksterlando.

Fine finnaj fratoj: k i i t o s !

(I o - I u.)

Ĉeĥoslovaka esperantomovado restariĝis.

— — — Nia Asocio restariĝis. Baldaŭ aperos nia organo: Ĉeĥa Esperantisto. De ĉiuj flankoj de nia lando venas al ni leteroj montrantaj grandan intereson de la antaŭmilitaj membroj kaj ankaŭ de novaj aliĝantoj. En multaj lokoj, ĉefe en Praha, post fermo de la grupoj fare de gestapo, niaj samideanoj kunvenadis private. Nun grupoj ekvivas kun oficiala aprobo.

Bedaŭrinde pluraj samideanoj ne revenos plu al sia laboro: fortrenitaj de la germana polico ili perdis la vivon per hakilo aŭ en germanaj internigaj kampoj (Konzentrationslager).

Kun ĝojo ni informas vin pri renovigo de la esperantodisaŭdigo en nia lando. Stacio Praha I dissendas:

1) sur ondoj 470,2 kaj 1571 m ĉiulunde kaj ĉiujauĉe de la 22,20 ĝis 22,30 horo mezeŭropa tempo (MET). Tiuj 10 minutoj estas disponigitaj al nia Asocio. Parolis

jam s-roj Ad. Malik, Rud. Hromada, Jar. Benda kaj Vuk Echtner.

2) sur mallonga ondo 31,41 kaj sur longa ondo 1571 m ĉiutage de 23 horo ĝis 23,15 (oficialaj informoj pri Ĉeĥoslovakio), parolas Ad. Malik.

Bonvolu diskonigi tion inter viaj membroj kaj instigi ilin, ke ĉiu aŭskultanto skribu al nia Asocio (adreso: Esperanto-Asocio Praha 47) kiel li aŭdas, dezirojn, kritikojn, ktp.

Sindikata Centro (ĉeĥa mallongigo URO) ĵus informis nin, ke ĝia komisiono por faka instruado metis en la instruplanon de siaj vesperaj lernejoj popolklerigaj (Lernejoj de Laboro) ankaŭ esperanton. "Konsiderante, ke niaj lernejoj ekzistas en ĉiuj pli grandaj urboj de Bohemio kaj Moravio, estos tiamaniere ebligita ankaŭ disvastigado de esperanto en pli granda mezuro ol antaŭe", skribas la komisiono. Forta movado estas do atendebla.

Jarkonferenco en Åmål.

La 29an de majo la distrikto Värmland-Dal havis konferencon en Åmål. Delegitoj el Arvika, Karlstad, Grums kaj Åmotfors partoprenis. La prezidanto de la klubo en Åmål R. Forsberg salutis la ĉeestantojn bonvenaj. Por prezidi la konferencon oni elektis s:ron Greger Andersson. Por la jar- kaj ekonomiaj raportoj la estraro ricevis deŝarĝon. La raportoj de la delegitoj pri la studlaboro estis sufiĉe ĝojigaj, precipe s:ro Hellerstedt, Karlstad, povis raporti pri esp. kurso en la popollernejo tie, gvidita de instruisto R. Johansson, kiu sukcesis interesigi la tieajn instruistojn por esperanto. E. Hult, Arvika, raportis pri la laboro de la kunlabora komitato, kiu ricevis laŭdon pro energia agado. La estraranoj estis reelektitaj: prez. Greger Andersson, kasisto Tulla Holfelt, sekr. Sigge Martinsson, vicprez. Dagmar Svensson kaj vicsekr. Ruth Olsson, ĉiuj el Åmotfors. La kunlabora komitato: Einar Hult, Arvika, Georg Nordling, Grums, R. Johansson, Karlstad, kaj Edv. Gustafsson, Åmål. Laŭ propono de E. Hult oni decidis eldoni gazeton, kiu estu ligilo por la anoj kaj eksanoj de nia distrikto. Laŭ propono de Ernst Karlsson, Grums, ni fondis helpkason por povi sendi la gazeton senpage al multe da eksanoj. La konferenco estis tre sukcesa dank al la uzado de esperanto kaj la vigla partopreno.

E d v. G u s t a f s s o n.

En SEF:s veckotidning är ett förslag, som förbundsstyrelsen f. n. har på sitt bord. Syftet är att få snabbkontakt mellan styrelsen och medlemmarna och mellan dessa senare inbördes. Espero skulle sopas ren från föreningsmeddelanden och utkomma helt på esperanto.

Utredningen av frågan, som har stor ekonomisk räckvidd, pågår.

Veko är en ny klubbtidning. Den utges av Västerås Esperantoklubb och redaktör är civilingenjör Sven Alexandersson. Veko berättar med naturlig stolthet om sin originella propaganda med ett salustånd på Stora torget i staden. Resultat: sålda läroböcker och 100 nycklar samt, främst, 50 esperantovänners adresser.

Klubbsekreteraren, hr Anders Bergsten, saluständs-idéns fader, leder redan en nybörjarkurs.

ESPERANTO-INSIGNO (sveda kaj esp. flagoj) perdita en Björkås estas rericivebla ĉe Gustav R. Johansson, Tegnérg. 16, Karlstad.

SEIF Spalten

LA ESPERANTO-SEMAJNO.

Kvankam ni laboris ĝis malfrue preskaŭ ĉiun vesperon en la sekretariejo, ni tamen ne sukcesis pretigi ĉiujn sendaĵojn por la "semajno" en promesita tempo. Tial kelkaj el vi ricevis la paperojn nur post la komenco de la semajno, sed ni esperas, ke vi malgraŭ tio povis utiligi ilin por la loka propagando.

La kaŭzo de la malfruiĝo estas tio, ke nur 63 el 200 elsenditaj propagandajmendiloj revenis en ĝusta tempo — 1/9. La lasta venis la 27/9 sed tamen restas pli ol 125 membroj, kiuj tute ne respondis!

Se vi ne ricevis nian cirkuleron tio devas dependi de tio, ke nia adresaro ne plu estas aktuala. Tio speciale koncernas klubojn. Multaj neglektas ensendi sciigon pri la adresoj de la novelektitaj estraranoj kaj tial niaj cirkuleroj estas sendataj laŭ malnova adreso. Memoru tial: tuj informu al SEF pri nova adreso.

La du unuaj raportoj pri la semajno venis jam la 23/9 de Bjarne Beckman, Strängnäs, kaj Anders Andersson, Järvsö. Modela propagando modele raportita!

AMIKARO DE S E F.

De nordo al sudo:

Jen listo pri la 48 membroj, kiuj ĝis nun aliĝis:	
La Espero, Sollefteå.	Wolmer & Nilsson,
Söderhamns Esp.-klubb.	Tungelsta.
Edith Bodén, Borlänge.	Hj. Kilberg, Vingåker.
Esperanta Kvinopo.	Grupo no 1, Norrköping.
Bjarne Beckman,	B. Söderlund, Kumla.
Strängnäs.	Hallsbergs Esp.-fören.
Alb. Björnemo, Kolsva.	E. Carlén, Hällabrottet.
Örebro Esp.-fören.	La Aglo, Karlskoga.
C. J. Jansson, Hällby-	G. Blomberg, Falköping.
brunn.	Falköpings Esp.-klubb.
La Stelo, Eskilstuna.	La Verda Kvinpinto,
E. Malmgren, Sthlm	Skövde.
Eva Julin, "	Sepino, Surte.
T. Julin, "	B. Sjölander, Göteborg.
Edith Bohlin, "	Knut Milton, "
K. Wästfelt, "	O. Juhlin, Hamburgsund.
Fr. Skog, "	O. Olsson, Vimmerby.
Ad. Larson, "	A. Sonesson, Emmaboda.
W. Wahlund, "	S. Olsson, Strömsnäsbruk.
Elisabet Olson, "	Hilda Karlsson, Klippan.
Greta Lindvall, "	Kvinopo, Kristianstad.
Anonima s—ino, "	Karla Jönsson, Rynge.
Asta Håkansson, "	L. Magnusson, Malmö.
Almida Zetterlund, "	R. Demuth, "
Alfhild Svedmark, "	Lilly Gleminger "
Ebba Danelius, "	Klara Waldén, Ystad.

6 promesantoj ankoraŭ ne ensendis aliĝilon, i. a. Borås, Skara, Vetlanda kaj Uppsala. Sed ili certe venos kaj krome multaj aliaj, kiuj nun scias, ke SEF bone uzis parton de la ricevita mono por la tutlanda propagando. Multaj realigotaj projektoj tamen postulas ankoraŭ pli fortan ekonomion. Pripensu ĉu ne kelkaj en via klubo povus kune fariĝi "membro" de AMIKARO. Restas nur 20 membroj por ke ni povu atingi la deziratan nombron 75.

KORESPONDO-CENTRO.

Por helpi kaj svedajn kaj eksterlandajn korespondemulojn trovi kontakton SEF decidis aranĝi centron por peri leterojn inter ili. La svedoj kiuj deziras korespondi skribu leteron al nekonata esperantist(in)o, metu ĝin en afrankitan koverton (30 oeroj) s e n a d r e s o

kaj sendu ĝin al ni menciante kun kiu vi volas korespondi. Ni sendos vian leteron al konvena esperantist(in)o en eksterlando, kiu petis nin pri korespondamiko en Svedio.

Eksterlandanoj ATENTU! Se vi deziras korespondi kun sveda esperantist(in)o, sendu nur poŝtkarton kun preslitere skribita nomo kaj adreso (kaj noto pri profesio, aĝo, temo ktp) al:


Sveda Esperanto-Federacio, Korespondo Centro
Tegelbacken, STOCKHOLM, Svedio.

Jam multaj petoj venis al ni el eksterlando kaj de svedaj samideanoj, tial ni estas pretaj tuj kontaktigi vin kun bonaj geamikoj.

POSTA TRAFIKO.

Leterojn, poŝtkartojn kaj presajojn vi nun povas sendi al ĉiuj landoj krom Albanio, Germanio, Aŭstrio, Japanio kaj landoj okupitaj de Japanio. Al Nederlando kaj Greklando oni ne rajtas sendi ilustritajn kartojn. Aero-poŝton oni povas sendi al la plej multaj landoj krom Sovetio, Rumanio, Bulgario kaj Greklando.

S a m.



Meddelande från Esperanto-Institutet

ESPERANTA STUDSERVO.

I avsikt att förse fortsättningskurserna med ett effektivt studiematerial har Svenska Esperanto-Institutet sedan tre år tillbaka låtit utgiva Esperanta Studservo. För rena nybörjare lämpar sig icke Esperanta Studservos texter men väl för fortsatta studier, vare sig dessa bedrives enskilt eller i kurs. Och det är framför allt dess lämplighet i fortsättningskurser som institutet vill understryka.

Esperanta Studservo är en korrespondenskurs.

Varannan vecka utsändes en svensk text direkt till beställarens personliga adress. Den följes efter 14 dagar (i samma kuvert som nästa svenska text) av en med kommentarer försedd översättning. Ingenting skall alltså insändas för rättning. Sådant ombesörjer var och en själv med tillhjälp av mönsteröversättningen.

Beställning sker genom att insätta avgiften, kr. 3:50 för hela kursen, på Malmö Esperantoförening, Malmö, postgirokonto 38714. Denna förening har fått institutets uppdrag att ombesörja de organisatoriska detaljerna. Om man samtidigt vill beställa de båda kommande terminernas e x a m e n s t e x t e r, tillkommer 40 öre, och totalbeloppet blir alltså kr. 3:90.

GLOSLISTA.

Svenska Esperanto-Institutet har beslutat utgiva en gloslista till den nyligen hos Förlagsföreningen Esperanto, Stockholm (postfack 19071, Stockholm 19, postgirokonto 578) utkomna "Hasse Z"-boken med ett urval av Hasse Z:s noveller.

Att lämna glosor till hela boken har ej ansetts nödvändigt. Ett antal lämpliga avsnitt har utvalts.

Det är institutets förhoppning att icke blott de enskilda esperanisterna utan även — och i högre grad — kursernas arbete härigenom skall underlättas.

Gloslistan betingar ett pris av 50 öre. Beställning sker hos Malmö Esperantoförening, Malmö, postgirokonto 38714, och kan göras exempelvis samtidigt med beställning av Esperanta Studservos texter. Det finns plats för meddelande å postgirotalongen.

Distributionsarbetet underlättas avsevärt, om kurs, vars deltagare givetvis önska erhålla var sitt exemplar av gloslistan, ville göra en samlad beställning till en enda adress.

Svenska Esperanto-Institutet.

SVEDA KRONIKO

Grupo Esperantista de Stockholm. Kunvenoj en la monatoj aŭgusto kaj septembro.

La 22-an de aŭgusto la grupo rekomencis sian agadon kun kunveno, en kiu s-ro Bepperling parolis pri la kolorteorio de Ostwald; estis la lasta vespero en lia serio pri "Normigoj". Ni aŭdis kiel profesoro Ostwald konstruis similan sistemon pri koloroj kiel Bach pri muzikaj tonoj, diferencigante "buntajn" kaj "nebuntajn" kolorojn kaj difinante 680 normajn nuancojn.

La 29-an aperis viva gazeto, kiu ĉifoje ĉefe transprenis artikolojn el aliaj gazetoj.

La 5-an de septembro f-ino Olsson raportis pri la somerkurso en Punkaharju. Tiu raporto estis kompletigata de s-ro Morariu la 12-an de septembro.

La 19-a kaj 26-a preskaŭ tute dediĉitaj al la projektitaj kursoj, la unua tago al propaganda preparo, la alia al raportoj.

La 25-an la grupo aranĝis publikan provlecionon de s-ro Morariu post bonega enkonduka parolado de rektoro d-ro Söderberg. Al la kurso por komencantoj, kiu okazos dum 20 semajnoj kun duhora vespero posemajne, anoncis sin 24 partoprenantoj (Kungsholmens Kommunala Flickskola, kosto 20 kr.). S-ino Julin gvidos kursojn por progresintoj (kosto 17:50 kr.). Lernolibroj kaj vortaroj enkalkulitaj en ambaŭ kursoj. La kursoj de s-ino Julin okazos jaŭdojn (Kungsholmens Kommunala Flickskola) kaj vendredojn (Nytorgsgatan 15. Tel. 42 53 84).

Kurs i Stockholm. Fortsättnings- (konversations) kurs hälls: **torsdagar** i Kungsholms Kommunala Flickskola, Västerbroplan (spårvagn 4) kl. 20 samt **fredagar** Nytorrgsgatan 15 ö. g. 4 tr. (Julin). Kursledare: Fru Eva Julin. Kursavgift 15 kr., inkl. böcker (c:a 2:50 kr.). Anmälan per tel. 42 53 84.

Arbetar Esperanto-Förbundets kongress.

Svenska Arbetar Esperanto-Förbundet höll sin 16:e kongress i Kalmar den 22—23 september.

Kongressdeltagarna samlades på lördagskvällen till samkväm och började sitt arbete på söndagsmorgonen i föreläsningssalen i Stadsbiblioteket. Av den föredragna verksamhetsberättelsen framgick att förbundets ekonomi varit ansträngd, i följd varav enskilda medlemmar fått bära en stor del av med verksamheten förenade kostnader. En stor lättnad hade inträtt år 1944 sedan Svenska Järnvägsmannaförbundets kongress beslutat ett anslag till förbundets verksamhet. Kongressen uttryckte sitt varma tack för denna hjälp.

ESPERANTOBLADET —

de norska esperantisternas organ —

utkommer ånyo med september månad. Första numret har ägnats åt de gångna krigsåren och innehåller minnesartiklar över fallna norska esperantister. I övrigt utlovas att tidningen skall bli innehållsrik och intressant så att den även kan intressera svenska läsare.

Pris till årets slut 1 kr. Abonnemang tills vidare endast hos

Förlagsföreningen Esperanto

Box 19071 Stockholm 19 Postgiro 578

Under förhandlingarna, vilka helt fördes på esperanto under ordförandeskap av Gunnar Rosell i Stockholm och Einar Adamson i Göteborg, lämnades redogörelser utvisande att intresset nu åter är i stigande på flertalet orter.

Till ny styrelse valdes: Gunnar Rosell, H. Ekstrand, Justus Boberg, Folke Gullmarstam och Yngve Nilsson, samtliga i Stockholm.

En av kongressens resolutioner innehöll följande:

Den nödvändiga kontakten mellan arbetare i alla länder hindras av språksplittring. Det är naturligt att kunskap i nationella språk, som ha stor utbredning i världen, kan mildra verkningarna av språkolikheten. Med full förståelse för nyttan av kunskaper i främmande nationella språk, vill dock kongressen fästa uppmärksamheten på att språkolikheten i världen icke på sådant sätt kan elimineras. Därest vi önska en verklig lösning av världens språkfråga måste arbetarna visa intresse för en lösning på basis av ett neutralt hjälpspråk. Ett sådant språk finnes redan och det har visat sig fullt motsvara uppgiften.

Kongressen uppmanar därför alla: Lär esperanto! Använd alltid esperanto i förbindelse med utländska kamrater!

Korespondado.

Se vi volas korespondi kun esperantistoj, turnu vin al Sveda Esperanto-Federacio, kiu starigis korespondcentron.

S-ro Desmond J. Langman, 111 Showell Green Lane Sparkhill, Birmingham XI (17-jara bibliotekisto).

H. S. Goudsmid, Groenteweg 18, Den Haag, Nederland (Postrestas sola el sia tuta fam.).

Mary Dillon, 184 Brunshaw Rd. Burnley, Lancashire, England (17-jara, kun gesvedoj).

Du ingenieroj deziras gekorespondantojn el ĉiuj landoj. Ni estas interesataj pri scienco, literaturo, homa kunlaboro kaj multe da aliaj temoj. Skribu al: Alderin Leijder, Vindarnas väg 4 E, Karlskoga 5, kaj al Yngve Lidbo, Vindarnas väg 2 E, Karlskoga 5, Svedujo.

Emilo Jirku, nacia fabrikestro de cementfabriko Hor. Srnie p. Nemšová, Ĉeĥoslovakujo.

A de Visser, asekurmaklero, 34-jara, edziginta, Oudenhovenstraat 6, Dordrecht, Nederlando.

K. Wilgenhof, Wilhelminastraat 28, Reverwyk, Nederlando.

S-ro Klaas Dekker, v/d Helstplein 6, II an., Amsterdam Z, Nederlando.

Esperantisto klubo en Trollhättan, Svedujo, aranĝos korespondan vesperon 21 dec k invitas geesperantistojn el ĉiuj landoj sendi poŝtkarton aŭ leteron. Certe respondos. Adr.: S-ro Eric Sörensson, box 255, Trollhättan, Svedujo.

S-ro Gösta Akesson, Lantmannaskolan, Svalöv, Svedujo, deziras korespondi kaj interŝanĝi PM kun geesperantistoj en la tuta mondo.

Dudeksesjara nederlandino deziras korespondi. Fraŭlino Willy Bood, Marnschade 57 I, Amsterdam (C), Holland.

Mi volas korespondi kun svedo pri diversaj temoj. Mi estas ĉefinstruisto, 45-jara. J. C. VOS, Kamperfodieweg 69, AMSTERDAM, Holland.


Ett begränsat antal utländska Nycklar:

engelska, franska och spanska, har inkommit. Pris 35 öre inkl. oms. och porto. Likvid i frim. eller pr postgiro. Endast mot förskotts betalning.

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO

Box. 19071 Stockholm 19. Postg. 578.

**Svensk succé!
Världs-succé!
Esperanto-
succé!**



Denna bok, ett tidsdokument av osedvanligt värde, har blivit den internationella bokmarknadens best seller. Bland länder, som förvärvat utgivningsrätt, kan nämnas Danmark, Finland, Norge, Argentina, Brasilien, England, Frankrike, Schweiz, Spanien, Tjeckoslovakiet och U. S. A.

Har Ni inte redan beställt den, fyll i nedanstående anmälningsedel och sänd in den — men gör det i dag!

Till **Förlagsföreningen Esperanto**
Box 19071, Stockholm 19.

ANMÄLNINGS—BESTÄLLNINGSEDEL

Undertecknad är intresserad av Literatura Klubo STELO-LIBRO och anmäler mig härmed såsom medlem.

Jag beställer ex. av "La Fino", häft. kr. 5.80
bunden » 6.80

Jag förklarar mig beredd att utlösa åtminstone de fem först utkommande volymerna och att, om jag vill avgå såsom medlem, anmäla detta ett kvarts år i förväg.

Betalningen sändes pr postgiro 578 (Eldona Societo Esperanto, Box 19071, Stockholm 19) — uttages pr postförskott.

(Stryk det som ej passar!)

Namn

Adress

Stad eller ort

Svenska Esperanto-Tidningen
La Espero

Organ för Svenska Esperanto-Förbundet

Postadr.: Postfack 19071, Stockholm 19.

Redaktör: Eva Julin, Nytorgsgatan 15, 4 tr. ög., Sthlm.

Ansvarig utgivare: W. Wahlund.

Prenumerationspris: helt år kr. 4:—. Lösnummer 0:35.

Utkommer en gång i månaden.

SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET (Sveda Esperanto-Federacio), Tegelbacken, Stockholm C. Tel. 20 00 43. Postgiro 20 12.

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO u. p. a., postadress: Box 19071, Stockholm. (Expedition: Sveavägen 98.) Tel. 31 65 01. (Förlagschefen: 30 75 15.) Postgiro: 578. (Böcker, tidningar, korrespondenskurser o. s. v.)

Nu komma de efterlängttade böckerna!

Vivo de Zamenhof.

Av esperantorörelsens store vältalare

Dr EDMOND PRIVAT.

Denna ypperliga bok, som intimt skildrar vår "mästares" liv och verk och som varit omöjlig att anskaffa till alla dem som under kriget velat ha den, har nu inkommit på nytt. Illustrerad. Kartonnerad.

Pris kr. 5:50 + 15 % skatt och porto.

Skynda att beställa innan denna första lilla sändning tar slut!

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO.

Box 19071 STOCKHOLM 19. Postgiro 578.

Denove aceteblaj:

La Sankta Biblio 8:—

Nova Testamento 2:—

Aldonu 15 % por imposto kaj afranko.

Förlagsföreningen Esperanto

Box 19071 Stockholm 19 Postgiro 578

YTONG

är det idealiska väggmaterialet för bostadshus och industribyggnader. Tack vare den stora isoleringsförmågan ger den fuktfria och sunda bostäder. Undvik trähusets brandrisk och höga underhållskostnader. Bygg i bättre klass genom att använda Ytong.

Bygg för framtiden ett högisolering stenhus till samma eller lägre pris än ett trähus.

YXHULTS STENHUGGERI A.B.
Hällabrottet

